# Statutoj ILERA

ILERA estas unuiĝo de radioamatoroj, kiuj uzas Esperanton por siaj celoj.

**LA CELOJ DE ILERA** estas:

a. Varbi membrojn inter radioamatoroj kaj Esperantistoj.
b. Kunordigi Esperantistajn Radioamatorojn por pli interesa kaj efika agado.
c. Alporti humanan helpon al socio uzante potencialajn agadeblecojn de esperantistaj radioamatoroj.
d. Kunlabori kun ĉiuj homoj kaj organizaĵoj, kiuj agadas kontraŭ la lingva diskriminacio.

**KONFORME AL SIAJ CELOJ ILERA:**

a. Eldonas bultenon kaj diplomon
b. Organizas konkursojn.
c. Aŭspicias diversskalajn renkontiĝojn.
d. Kunordigas eterajn rondojn, renkontiĝojn, komunajn laborfrekvencojn.

**MEMBRECO**

Membro de ILERA estas ĉiu radioamatoro kiu agnoskas la statuton kaj aktive subtenas la agadon de ILERA. Ĉiu membro havas personan registritan membrokarton.

**STRUKTURO DE ILERA:**

La prezidanto, Vicprezidanto(j), sekretario(j), kasisto(j) kaj landaj (teritoriaj) reprezentantoj formas la estraron de ILERA la landa reprezentanto estas tute suverena en sia lando kaj kunordigas la tutan agadon. Agaddaŭro de la estraro estas 5 jaroj.

**KOTIZOJ**

Sian efektivan membrecon kaj aktiveconmembro de ILERA manifestas per akurata pagado de la membrokotizo. Ĝi estas pagata al la landa reprezentanto aŭ rekte al ILERA-konto difinita de la estraro.

Ĉefaj elspezoj de la kolektita sumo estas: Eldono de la bulteno kaj ĝia ekspedo, poŝtaj elspezoj. Financa raporto estas publikigata po unu foje ĉiun jaron en la bulteno.

**ŜANĜOJ DE LA STATUTOJ**

Ŝanĝoj en la statuto difinas la estraro. Proponoj pri ties ŝanĝoj estas bonvenaj al la estraro kaj estas diskutataj en cirkuleraj leteroj.